

# Gazeto Andaluizia

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

13a Jarkolekto

\*

Septembro, 1996

N-ro 47



## GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. IMPRIME: COPICENTRO, Alameda Principal 42, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 Málaga), José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ (joser@lander.es).

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ.

GRÁFICOS: Fondo informático de AEU.

Efika Esperantismo / 14	3
Beletra Konkurso	4
Muziko: Koncerto de Solo	5
Pledo por koreco	7
Recenzo: Lirikaj Perloj de Al-Andalus	8
Kiel ekestis la esprimo <i>krokodilo</i> ?	9
Radioamatora Angulo	10
Literatura Konkurso: <i>Gazeto Andaluza 50</i>	11
Poezia angulo	12
Esperanto-Kulturo	13
10 sciindaj aspektoj pri Esperanto kaj Afriko	17
Paĝoj de nia Historio	19
Krucvortenigmo	20
Profiti la flugilojn de favora vento	21
Alvoko al Ĝenerala Asambleo	22
Esperanto Aplikata	23

Ne estas malproksima nia 50a numero: ni alvokas konkurson por celebri (legu paĝon 11). Kunlaborantoj bonvolu kontakti nin!



## Efika Esperantismo / 14

La historia materialisma skolo asertas, ke la propra disvolviĝo de la materialaj kondiĉoj determinas la penson de la homoj. Laŭ tiu determinismo malmulte aŭ nenion povus fari la homoj por projekti sian propran estontecon. Estas certe, ke la materialaj kondiĉoj ebligas al la homoj projekti kaj enkonduki sociajn ŝanĝojn, sed tiu ebligo restas nur ebleco, kiun oni povas atingi aŭ ne, ĉar ĝi dependas de la penso kaj agado de la homoj mem. La estonteco ne estas determinita kaj sur tio kuŝas la libereco de la homo kaj ankaŭ ties respondeco. Ni bone povas certigi, ke antaŭ ol la malkovro de Ameriko fare de Kristoforo Kolumbo, eĉ ne povis esti komprenebla la unueco de la homaro. La mondo fakte estis dispartigita, ĉar la tiamaj distancoj estis, laŭ la malrapido de la komunikado, enormaj kaj la kontaktoj sporadaj. Sur la maro nur velŝipoj, irantaj laŭ la kaprico de la ventoj. Surtere piede por la plimulto aŭ ĉevalo aŭ ĉevalveturiloj por la povantaj, sed sen aranĝitaj vojoj. La komunikado malrapida, ne ekzistis la telegrafoj nek la telefono kaj eĉ ne la poŝto. La homaro tiam devige devis esti disigita. Se ekzistis ligiloj pli vastaj ol la geografiaj regionoj, aparte de malgranda komercado, estis la grandaj religioj.

En kvin jarcentoj la civilizacio tiel rapide evoluis, ke ankoraŭ la plimulto de la homoj ne akordiĝis sian pensmanieron al la nuna realo. La realo estas, ke nia aktuala mondo jam estas materiale unuigita. La moderna materiala vivo, en la industria socio, estas simila en la tuta disvolviĝanta mondo. La aviado tiel reduktis la distancojn, ke oni povas diri, ke ili ne ekzistas, kaj laste *Internet* fariĝas kiel monda reto de interkomunikiĝo neniam antaŭe eĉ imagebla. Tamen, la mondo ankoraŭ estas organizita laŭ hereditaj ŝtatoj formataj en aliaj historiaj cirkonstancoj, ne adekvataj al la nuntempaj. La tiamaj distancoj kaj la tiamaj armiloj kondiĉis la siatempajn ŝtatojn kaj eĉ la oficialajn lingvojn. La lingvoj kiuj restis sen ŝtato dekadencas kaj la dialektoj eĉ malaperas.

La nuntempaj sociaj problemoj estas supernaciaj. La politiko jam ne povas sin apogi sur la milito, kiel okazis ĝis nun. Ĝenerala mondmilito pere de la novaj armiloj detruos la homaron. La malgrandaj militoj, propraj de subevoluintaj landoj, devas esti bremsataj de la grandaj potencoj. La ekonomiaj krizoj fariĝas tutmondaj kaj necesigas planedan ekonomian ordigon. La ekologia ekvilibro ankaŭ bezonas planedan agadon. Kaj la plimulto de la homoj aŭ pensas nenion aŭ ankoraŭ pensas nacie kaj eĉ la reviviĝo de la mezepoko per plimultigo da ŝtatoj.

La ĝenerala opinio ne pensas planede, tute kontraŭe, ĉiu pensas nur pri si mem kaj tio disigas la socian koheremon. Pro malvasta mondkoncepto aperas etnaj konfliktoj.

La kondiĉoj por unuigi la homaron jam estas pretaj, sed tio ne kunportas la



homarunuiĝon, mankas la konvinko de ties neceso kaj la volo ĝin impulsi. En Eŭropo pro la sekvoj de la forpasinta dua mondmilito, la nomata malvarma milito, oni jam entreprenis la eŭropan unuiĝon, certe, preskaŭ sen la apogo de la homamasoj. La demokratia unuiĝo povas kompreni ĉiujn landojn en kiuj regas la homajn rajtoj kaj aliĝi al ĝi la restantaj landoj laŭ demokratiĝo kaj regado de la homaj rajtoj.

Ĉu la tasko ŝanĝi la ĝeneralan pensmanieron por impulsi la homarunuiĝon ne estas precize la tasko de la esperantismo? Alporti novan penmanieron kaj novan planedan kulturon, jen la laboro de la esperantismo. Sen tiu agado, la rutina kantado de *La Espero* ŝajnus nura sarkasmo.

Nuntempe Usono mastras la mondon kaj la angla lingvo rolas kiel tutmonda helpa lingvo. Post ne multaj jardekoj Orienta Azio fariĝos alia granda centro de povo. Ĉu la japana aŭ ĉina lingvoj ankaŭ devos esti lernataj de la eŭropanoj? Ĉu la konkurado inter tiuj centroj de povo restos ĉiam paca?

La kondiĉoj por la homarunuiĝo jam estas adekvataj, eĉ urĝas la homarunuiĝo, sed sen ĝenerala ŝanĝo de la pensmaniero kaj kreado de nova kulturo kun la adekvata impulso de la ĝenerala opinio la afero prokrastiĝos kaj prokrastiĝos kaj la mondproblemoj akriĝos kaj akriĝos. La nura irado de la tempo solvos neniun problemon.

Zamenhof elpensis la lingvon Esperanto kiel ilo por la homarunuiĝo. En 1905, en la unua kongreso oni ne komprenis tiun unuiĝon surbase de la homaranismo. Zamenhof ne eraris en sia sinteno. La sinteno de tiuj tiamaj esperantistoj kaj de la ĝenerala opinio pli incitis ol bremsis la unuan mondmiliton kaj tiu generis la duan.

La tempo de la esperantismo jam alvenis, ne kiel nura portanto de internacia helpa lingvo, sed kiel movado impulsanta la homarunuiĝon.

GIORDANO MOYA



### Beletra Konkurso

Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj Andaluza Esperanto-Unuiĝo organizas la Beletran Tradukan Konkurson *José Rodríguez Huertas*. Nur eblas konkursi per tradukoj en la hispanan de originaloj verkitaj en Esperanto.

La limtempo de akceptado de la verkoj finiĝos la 31an de oktobro, 1996. Tiurilate la poŝta stampo atestu la daton. Oni devas sendi la verkojn al Sindikato Nacional de Escritores Españoles, Apartado 632, E-29015 Málaga, Hispanio / España.

La tutan regularon oni povas legi en *Gazeto Andaluza* 45 aŭ ricevi de la redaktoro.



### Muziko

Koncerto por sintezilo kaj voĉo *Astra*  
fare de SOLO

5an de junio, 1996

ĉe la Templo-Eklezio de la Sankta Anĝelo (Malago)

Daŭro de la koncerto: 45 minutoj.

La programo estis interesa: oni anoncis debuton de 2 muzikaĵoj influitaj de la muzik-stilo de la elektra-klasika muziko de nia jarcento. Ambaŭ muzikaĵoj respondas al la nomoj *Reĝina Hotelo 777*, kaj *Demetrios kaj lia Ŝipo*.

Je la 9a vespere la templo estis preta por la koncerto: interne nur estis natura lumo de la cirioj kune kun la parfumada odoro de la incenso. 5 minutoj post la 9a aperis la pastro de la paroĥejo kiu tre klare prezentis la eventon: li informis ke tiu koncerto estas kuraĝa iniciativo de la muzikisto kaj de li mem, unuafoje tia stranga muziko kune kun tiu lingvo estis koncertita en templo de Malago.

Poste, la koncertisto subite aperis suraltare; la koncerto komencis antaŭ la silenta rigardo de la aŭskultantaro. Bonega rezulto, kvankam preskaŭ neniu spertis pri tiu speciala muzik-stilo. La voĉo kun la kantoj en Esperanto estis klara, kio estas interesa por la disvastigo de la lingvo.

La koncerton ĉeestis amaso da ne-esperantistoj.

Anekdote oni rakontu, ke post la koncerto, Solo aperis jam normale vestita por repreni la aparatojn. La ĉeestantoj ankoraŭ estis en la templo kaj iu de la publiko demandis per laŭta voĉo *Ĉu ĉio jam finiĝis?* Solo respondis jese, kaj la ĉeestanto proteste kriis *Kial? Estis tro mallonga, ĉu ne?*

Tiam *Gazeto Andaluza* mallonge parolis kun nia muzikema kolego.



GA: Kial vi nun elektronike komponas kaj muzikas?

Solo: Mia celo en la mondo de la muziko estas la kreado. Nun mi preferas muziki elektronike profitante ankaŭ la stilojn de la komponistoj de nia jarcento. Mi opinias, ke tia vojo povas esti





interesa por mia propra evoluo kaj lernado pri muziko, pri elektronikaj aparatoj kaj krome por la disvastigo de nia lingvo. Tiu stilo estas stranga, ĉar ne kutima, sed mi kredas ke mi povas atingi meti mian muzikon en gravajn etosojn de altaj niveloj (profesoroj, orkestr-direktoroj, klasikaj komponistoj...)

GA: Kial vi per ĉi tiun muzik-stilo ne uzas melodion? Ĉu tiuj melodioj estas koheraj?

Solo: Nu, mi ja uzas melodiojn, sed ne la kutimajn de la popolaj oreloj: la melodioj de ĉi tiu stilo estas influita de la *atonala* kaj *disonanta* sistemo kreita en la komenco de nia jarcento de gravaj komponistoj kiel Arnold Schoenberg, Bela Bartok, Ligeti, Lutoslawski kaj longa ktp. Tiutempe, tiuj komponistoj havis grandajn problemojn kun la kritikuloj kaj publiko, sed nuntempe tiu muzik-stilo estas tute normala inter la muzikemuloj kiel mi mem. Pro tio mi kredas ke la melodioj estas koheraj, sed ili estas kaŝitaj kaj apogitaj sur amaso da diversaj sonoj aperitaj en miaj muzikaĵoj. Ĉiukaze ankaŭ Mozart, Beethoven kaj Wagner havis amason da problemoj kun la *spertuloj-kritikuloj* kiuj nur intencas halti la evoluon de la muziko.

GA: Bonvolu klarigi al ni detalojn pri la argumentoj de viaj lastaj muzikaĵoj prezentitaj en via lasta koncerto.

Solo: *Reĝina Hotelo 777* estas dediĉita al domo kiu staras en la

ĉefa parto de Malago, la unua Reĝa Hotelo de Malago, konservita por la Reĝino Viktoria Eŭgenia kiam ŝi ferie alvenis al Malago. Mi loĝis tie dum 20 jaroj. En tiu domo okazis multaj anekdotoj ekde la jaro 1870. La masonoj de la urbo kunvenis en la alta parto de la domo; okazis pasia murdo: neniam oni eltrovis kiu estis la murdisto; dum la milito falis bombo kaj mortis amaso da infanoj kaŝitaj en la alta etaĝo. Io ĉiam impresis al mi: kio okazis kun la ĉambro de la Reĝino Viktoria Eŭgenia, kiu ĉiam estis fermita kaj malplena? *Demetrios kaj lia Ŝipo* estas influita de mia unua artverko farita kiam mi estis infano (15 jaroj). Temas pri fantazia historio de infano kiu pro siaj problemoj estis forpelita de lia planedo. Mi verkis ĝin en la lernejo pro peto de profesorino. La verkaĵo tre plaĉis al ŝi, sed la direktoro protestis kaj speciale punis min ĉar la verko havis religiajn kaj sociajn detalojn ne permeseblaj en la lernejoj de tiu epoko (1973-74).

GA: Kiuj estas viaj venontaj artaj projektoj?

Solo: Mi nun pretigas ebla eldono de la du muzikaĵoj prezentitaj en la lasta koncerto. Ankaŭ, pro malgajaj kialoj (mia patro ĵus mortis) mi pretigas por li jubilea meso: *Rekiem por floro kaj sintezilo*, kiu estos kantita en la latina kaj en Esperanto.

GA: Dankon, Solo, kaj grandan sukceson por viaj projektoj.



## Pledo por koreco

*"Se la homoj amas vin, la kialo estas,  
ke vi amis ilin pli frue"*

N.V. PEALE



La koreco, kiel potenca kuracilo, havas la virton fortigi sammezure kaj la praktikanton kaj la ricevanton; ĉar bonkori estas meti la koron en la agoj kaj en la traktado kun la aliuloj; kiu povus rifuzi plenaman rideton?

Koreco kondukas al la altruismo kaj la tenereco, ĉar etendante nian manon por animi kaj vekti tristan koron. De ĉiam ekzistas estuloj kiuj eltenas la vakuecon kaj la bezonon pro la manko de iu ĝentila kaj amema apud si. Iam ekde la infaneco oni

konstatas en la ĵusnaskito la bezonon de nutraĵo ne nur fizika, sed ankaŭ anima, pro tio, ju pli da homa varmo ni injektos en nian traktadon kun la aliaj, des pli granda la kvanto da koreco kiun oni redonos al ni, kvazaŭ en ciklo de la naturo en kiu la floro ricevas nutraĵon de tio kion ĝi iam liveris tia.

Ankaŭ la bestoj parolas al ni pri amemo per sia kunesto, kaj iuj el ili forestas kiam mankas la kunulo de aliaj tempoj. Tio ne estas la fino de malbono, sed esti kvazaŭ eta suno por kiuj partoprenas nian ekziston levus la koron de la plej kruda estaĵo Ĉu la koreco ne povus esti pli ofte praktikata sporto?

LOJ KAJ SIZIFO



- Estimata ano de AEU: ■
- Vi jam scias, ke AEU kalkulas kun viaj kotizoj por sia agado. La kotizo ■
- estas tre malmultekosta: 1700 ptoj po jaro. Se vi ankoraŭ ne pagis ■
- ĉijare, bonvolu sendi 1700 ptojn perpoŝte al AEU, Apartado 864, ■
- 29080 Málaga, enspezi ilin per la konto 17160710 de la *Caja Postal* ■
- (Poŝta Ŝparkaso) aŭ petu de ni instrukciojn por pagi perbanke. ■



## Recenzo

A. Marco Botella, *Lirikaj Perloj de Al-Andalus*, Institución "Fernando El Católico", Zaragoza 1995. 328 paĝoj, 21 cm. 1900 p-toj ĉe Libroservo de HEF.

Nia agema samideano A. Marco (konita en la hispana Esperantio i.a. kiel redaktoro de *Boletín de HEF*, eksa redaktoro de *Kajeroj de la Sudo*, kaj aŭtoro de *Analoj de la Hispana Movado Vol. I kaj Vol. II*) donacis al la Esperantistoj libron gravan kaj interesan.

Precipe rimarkinda mi trovis tion, ke la libro temas nek pri Esperanto nek pri esperantismo, sed pri parto de la historio kaj literaturo de la Iberia Duoninsulo tre nekonata de preskaŭ ĉiuj hispanoj kaj portugaloj: la periodo de Al-Andalus, t.e., de la araboj en la Duoninsulo. Ĉiuj konas ion pri la Rekonkero fare de la kristanoj; sed pri la araboj, kelkaj eĉ opinias, ke Al-Andalus estas araba nomo de Andaluzio, kiam fakte temas pri nomo de la araba imperio en la Duoninsulo, ĝis la Pireneoj.

Nu, kun la celo diskonigi la poezion verkitan en Al-Andalus, A. Marco prezentas al ni trarigardon al la socio, historio kaj literaturo de aŭtoroj kiuj verkis en tri lingvoj (la araba, la hebrea kaj la romanca), kombinitan kun tradukoj de la aŭtoroj plej signifaj de ĉiu periodo, kaj kun diversaj

anekdotoj. Admirinda socio, kie eĉ kalifoj orgojle verkis poemojn! Ankaŭ laŭaspekte la libro estas tre kontentiga: ĝi havas belan kovrilon, bonegan paperkvaliton, tre malmultajn pres- kaj kompost-erarojn. Ĉio kontraŭ prezo modera (surprize, ke libro tia hispanlingve verŝajne kostus pli da mono ol en Esperanto, ĉar niaj verdulaj libroj kutimas esti tro multekostaj). Do, libro orgojle montrebla al neesperantisto.

Libroj kiel *Lirikaj Perloj...* havas gravan evoluigan rolon en Esperantujo; ĝi enhavas apendicon kun la novaj vortoj enkondukitaj de la aŭtoro por priskribi realon pri kiu Esperantistoj malofte parolas. Neniun de ĉi tiuj neologismoj oni



povas taksu *balasta*: gravas, ke niaj vortaroj enhavu vortojn por *almorávide, almohade, casida, cadí, taifa, omeya* (almorabido, almoado, kasido, kadio, tajfo, omaĵo respektive), vortoj nepre scieblaj se oni parolas pri tiu epoko. Ĉiuj ĉi vortoj meritas eniron en la plej gravajn vortarojn (nova eldonuta *PIV, Vortaro Hispana-*

*Esperanta* de F. de Diego, ktp.), kiuj foje tro facile entenas vortojn rilatajn al aliaj eŭropaj landoj sed malfacile tiujn de aliaj regionoj. Mallonge, grava, interesa kaj bonpreza libro, aĉetinda de ĉiu interesiganto en la literaturo kaj historio de la Duoninsulo.

SIZIFO

Kiel ekestis la esprimo *krokodili*?

Ĝi estiĝis iom post iom pro la instrumetodo de Andreo Cseh [prononcu ĉe]. Kiel sciante, li ne allasis nacilingvajn klarigojn dum siaj lecionoj. Kiam iu lernanto nacilingve intervenis, li ektenis krokodilan pupon kaj avertis la kulpulon: "Ne krokodilul!". Eble mi forgesis kelkajn detalojn, sed la rakontfadeno estas pli malpli tia. Evidente oni rajtas demandi, kial Cseh elektis tiucele ĝuste la krokodilon. Mi supozas ke li tion faris dukiale:

a) La vorto *krokodilo* estas sufiĉe longa kaj enhavas preskaŭ duobligon ĉe la komenco (*kro-koj*). Do ĝi taŭgas kiel karakterizilo de alilingva parolo kiun oni apenaŭ komprenas. Oni ja ne forgesu ke la klasĉambroj de Cseh ĉiam plenigis plurnacia kaj dislingva lernantaro. Kelkajn el ties lingvoj Cseh certe apenaŭ aŭ tute ne komprenis. Se tio veras, la vorto *krokodilo* havus la saman rolon kiel *barbaro*, per kiu oni alitempe etikedis la homojn kiuj parolis alian lingvon ol la latinan aŭ helenan, kvazaŭ la parolo de tiaj homoj ĉiam sonus *bar-bar*.

b) La krokodilo estas besto iaspece unika, ĉar la proporcio inter ĝiaj buŝo-kaj korpo-longo estas eble la plej granda en la rampula aŭ eĉ en la tuta besta regno. Havante tiel grandan buŝon, ĝi malfacile kapablus reteni nedeziratajn kaj nepetitajn vortojn kaj frazojn nacilingvajn...

La vorton *krokodili* unufoje ekuzis tiusenca franca esperantisto Emilio Ferrari [vidu *Eventoj* 026, 2/marto'92]. El Francujo ĝi rampis tutmonden.



GONÇALO NEVES

GONCALO.NEVES@PEPSOCIFOODSINTL.SPRINT.COM  
el *Eventoj* 0104, 2/junio '96.



## Radioamatora Angulo

### Radioamatora Stacio

en la Universala Kongreso de Valencio, 1993

EA5DR, Albino, petis al la Radio-Klubo de Valencio instali kompletan stacion por 20-10 metroj kaj por 2 metroj en la kongresejo. La stacion aktivigis ne nur esperantistaj radioamatoroj sed ankaŭ hispanaj. Oni atingis pli ol 300 kontaktojn po tago, entute ĉirkaŭ 2000 kontaktojn dum la kongreso. La samideanoj kaj la hispanaj radioamatoroj propagandis la kongreson en la hispana kaj en la angla je ĉiuj bandoj, kaj ĉi tiel oni atingis ke preskaŭ ĉiuj radioamatoroj de la mediteranea zono de Hispanio eksciis ion pri Esperanto. Laŭ informoj de ILERA-Bulteno, la stacio estis aktivigata de EA5LS, Francisco (prezidanto de la Unión de Radioaficionados Españoles en Valencio), EA3BKL, Rafael, EA5DR, Albino, kaj la germanaj gesamideanoj DL7DE, Irene, DJ4PG, Hans, kaj aliaj.

Regulaj Rondoĵoj en la etero (Universala Tempo) de anoj de ILERA (Internacia Ligo de Esperantistaj RadioAmatoroj)

Zono	Tago	Frekv. (Mhz)	Horo (UT)
Azio kaj Pacifiko	sabate	21266	22h00
	dimanĉe	14266	22h30 + 24h00
		21266	02h00
Eŭropo	dimanĉe kaj lunde	14266	03h00
		14266	12h30
	sabate kaj dimanĉe	14266	20h30

ECB7-I-046745

STACIO ESPERANTO

\*\*\*\*\*

Jam aperis *Vinilkosmo-Kompil' Volumo 21* La enhavo estas eĉ pli diversila ol la unua, kun novaj muzikstiloj, famaj esperantistoj, junaj esperantistoj, malkovrindaj muzikaĵoj el Afriko, Sudameriko kaj Tutmondio... Pro mankospaco ni ne povas komenti plu en ĉi tiu numero, sed vi povos legi recenzon en nia venonta revuo. Se vi jam deziras aĉeti ĝin, bonvolu kontakti rekte *Eurroka-n* aŭ la LibroServon de HEF.



## Literatura Konkurso

En junio de 1997 aperos la 50an numeron de la revuo de Andaluza Esperanto-Unuiĝo, via *Gazeto Andaluza*. La respondecoj de AEU kaj de *Gazeto Andaluza*, opiniante ke tiu estos grava numero por revuo kiu aperas nur 4 fojojn jare, simbolante do laboron de 12½ jaroj, decidis organizi UNUFOJAN literaturan konkurson, kiun regos jena

### -Regularo-

- ① Nur eblas konkursi per noveleto(j) originale en Esperanto verkita(j), NE per traduko(j) el aliaj lingvoj.
- ② Ĉiu konkursant(in)o rajtas partopreni per tiom da konkursaĵoj, kiom li/ŝi volas.
- ③ Ĉiu konkursant(in)o devas sendi tri ekzemplerojn de la konkursaĵo, tajpitajn laŭ duoblaj interlinioj, kun la indiko "Konkurso: 50 numeroj de *Gazeto Andaluza*". La konkursaĵo ampleksu maksimume 6 paĝojn, po 30 linioj.
- ④ La konkursaĵoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por kaŝi la identecon de la konkursant(in)o. En aparta fermita koverto, surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto.
- ⑤ Kune kun la Verdikto, aperos la nomoj de la juĝintoj.
- ⑥ La dat-limo (laŭ la poŝtstampo) por sendi la konkursaĵojn estas la 31a de marto de 1997. La Verdikto publikigos en la 50a numero de *Gazeto Andaluza*, en junio de 1997. Oni diskonigos la nomon de la gajnant(in)o per aliaj gravaj revuoj esperantlingvaj.
- ⑦ Oni sendu la tekstojn al S-ro J.F. Martín, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago / Hispanio.
- ⑧ La premio konsistas el 10000 pesetoj.
- ⑨ *Gazeto Andaluza* rezervas al si la rajton publikigi la venkintan noveleton en sia numero 50, kaj en futura TTT-hejmpaĝo de AEU. Ankaŭ la plej bonajn nevenkintajn verkojn oni publikigos en la revuo, laŭ aparta konsento kun la aŭtor(in)o.
- ⑩ Ĉiun dubon pri ĉi tiu regularo solvos la juĝantaro laŭ sia bontrovo.

Malago, la 1an de septembro de 1996

J.F. MARTÍN

Sekretario de A.E.U. kaj de la konkurso



## Poezia Angulo

### Subsuniro en la maro

Tiu kastelo kiu staras sur la maro  
kaj sur ĝia ŝaŭma soleca ŝtono  
mi sidis,  
rigardante oranĝan nubon.

Falas la suno,  
svinga brulaĵo ruĝumas l' akvon;  
disgutis, flugante, lumon kaj ŝaŭmon,  
la blankaj mevoj.

Envolvita en la subsuniro,  
absorbata l'animo,  
tiu junulo  
sur roko, fronte al maro, revis.

### Haveno sen luno

Ekzistis en mia vivo haveno  
soleca.  
Kiel forgesi la nokton  
kiam mi ĝin trasiris, kun miaj  
malĝojoj de fidela junulo?

La nigra maro muĝas.  
Ĝis la lumturo,  
blanka luma linio,  
kaj perdita en la ombro, mi angore  
antaŭeniris.

La doloro estis blinda.  
Jam senanime  
– rompita kristalo  
la falita koro vibris halucine.

Nokto: Haveno sen luno  
ankoraŭ junaĝe  
kiam el mia sango ŝprucis  
ĉi melankolio kiu neniam forlasis min.

*Juan RUIZ PEÑA (nask. Jerez de la  
Frontera, 1915)*



## Esperanto Kulturo

*Tute ne estas mia celo reakrigi prilingvajn diskutojn kiuj de antaŭlonge okazas inter la defendantoj de la Iltisa kaj de la Analiza Skoloj. Tamen estus grava eraro se, por eviti ĉagrenojn al ili, Gazeto Andaluzia ne informus pri la respondaj teorioj al siaj legantoj. Tial, jen bazan sciigon pri la menciitaj skoloj.*

### Literatura Manifesto de la Iltisa skolo

Ni, esperantistoj, festas la signifan daton de la cent-jara jubileo de Esperanto. Kaj fakte temas pri evento vere celebrinda, ĉar ja io mirakla pulsas en la lingvo, se konsideri, ke de la momento mem de sia naskiĝo ĝi sukcese kapeis tra detruaj ŝtormoj kaj ĉio-renversaj uraganoj. Estas plej miriga kaj paradoksa fenomeno, ke ĉi ŝtormoj kaj uraganoj koviĝis ankaŭ en la esperantistaj medioj, t.e. en la sino de Movado, kiu levas la standardon de Esperanto kiel signon de interhoma paco kaj de universala frateco.

Ke Esperanto tamen ne splitiĝis en mil pecojn pro la negativa kaj miopa laboro de multaj esperantistoj, ŝuldiĝas unua-loke al la genia antaŭvido de Zamenhof. Li rigardis la literaturon baza premiso por la disvolvo de la lingvo kaj per siaj verkoj originalaj kaj tradukaj donis al ĝi la necesan koheron. La cent-jara tradicio beletra de Esperanto konstituas la rokon kontraŭ kies granitajn mason frakasiĝis sinsekvaj generacioj de reformuloj de la sintakso, de la morfologio, de la ortografio kaj eĉ de la baza strukturo de la lingvo.

Cent jarojn post la naskiĝo de Esperanto, la ĝenerala situacio de la Movado esence prezentas la saman panoramon kiel en la fruaj tempoj. Nun, kiel tiam, la ekstera mondo plu ignoras nin aŭ maksimume nin rigardas sektanoj iomete folaj kaj iomete ridindaj. Nun, kiel tiam, oni proklamas denove la samajn argumentojn, jam mil-foje ripetitajn, por la totala esperantigo de proprajn nomoj, por la ignoro de la gramatika karaktero de la radikoj, por la ŝanĝo de la aspekta verbo-sistemo al la tempa interpreto kaj por la enkonduko de alfabeto sen diakritaj signoj.

Aliflanke, kiel reeĥo de la pratempa Esperanto, eĉ eminentaj esperantistoj plu tamtamas, ke pro la senfine vorto-krea kapablo de la afiksa mekanismo, la enkonduko de neologismo estas nociva balasto por la lingvo, kvankam tion klare demontas la fina rezulto de multaj originaloj kaj tradukoj en Esperanto. Ĉi kulto al rudimenta lingvo tuj trovas favoran eĥon, ĉar tiaj esperantistoj flatas la intiman deziron de granda parto de la verda popolo, kiu volas uzi la lingvon nur kiel plaĉan hobion aŭ kiel simplan



ludilon, montrante tiel kuriozan trajton de intelekta dikotomio pro tio, ke ili sentas nul ĝenon antaŭ la pompo kaj pleto de siaj propraj naciaj lingvoj kaj aŭtoroj, nek antaŭ la senĉesa plimultigo de neologismoj en naci-lingvaj vortaroj, sed energie reagas kontraŭ la provoj doti Esperanton per tiom da esprim-eblecoj, kiom ĝi bezonas por konkurenci sur sama nivelo kun la naciaj lingvoj. Lasta-tempe kelkaj famaj aŭtoroj, iam kreintoj de ne-pokaj neologismoj, nekonsekvence pruntas siajn voĉojn al la fiore de partianoj de la hobia Esperanto. Tiel agis Baghy en la tridekaj jaroj, kiam li solidariĝis kun la amaso de eternaj komencantoj por bojkoti la tiutempe novan, kaj renovigan, lingvon de la genia Kalocsay.

Ĉar la kritikoj de la nunaj anatemantoj direktiĝas ĉefe kontraŭ la aŭtoroj originalaj kaj tradukaj, en poezio aŭ en prozo, kies plej signifaj verkoj publikigiĝis/as ĉe la eldonejo Iltis, necesas prezenti la principojn de la membroj kaj simpatiantoj de la t.n. Iltisa Skolo rilate la esperantan beletron kaj rilate la lingvon ĝenerale.

1. La Iltisa Skolo fidelas al la reguloj de la Fundamento de Esperanto.

2. La Iltisa Skolo inspiriĝas rekte en la artismo de la Budapeŝta

Skolo kaj ĉefe de ties korifeo Kálmán Kalocsay.

3. La Iltisa Skolo konscias, ke nia beleto, kaj nia lingvo entute, bezonas por sia plua evoluo kaj nuanca riĉiĝo daŭran enkondukon de neologismoj kaj de parolturnoj por familiaraj, vulgare kaj slangaj esprimoj. La Iltisa Skolo daŭrigas tiel la tradicion riĉigi la lingvon laŭ la ekzemploj kaj la konsiloj de Zamenhof kaj de niaj plej brilaj aŭtoroj.

4. La Iltisa Skolo laboras por progresemaj aŭtoroj kaj legantoj kaj atendas, ke ĝiaj kontraŭuloj konduku rilate al Esperanto kiel rilate al la propraj naciaj lingvoj, t.e., ke ili ne pretendu influi sur la literaturon, kiun ili ne favoras, kaj legu nur tion, kio plaĉas al iliaj lingvaj kaj estetikaj preferoj.

5. La Iltisa Skolo strebas uzi lingvon ĉiam pli riĉan, pli suplan, pli elvokivan, pli naturan, pli kapablan redoni al la tradukoj la



tutan vivon kaj freŝon de la nacilingvaj tekstoj, kaj laboras kun la intenco fari ĝin multe pli taŭga kaj adaptebla al la originala verkado en Esperanto.

La Iltisa Skolo aspiras ĉefe esprimi sin plej klare, koncize kaj simple en la formo, eĉ se okaze la temoj ne prezentigas facilaj kaj simplaj. Ankaŭ la slava spirito de Esperanto piedas per stilo simpla, klara kaj konciza, kiel eminente montras la traduka genio de K. Bein (Kabe).

ó. La Iltisa Skolo ne povas preni serioze la protestojn de kelkaj aŭtoroj kontraŭ novaj vortoj, ĉar ili mem uzas ne-pokajn neologismojn en kruda kontraŭdiro al siaj konfesataj konvinkoj, aŭ koncedas, ke oni uzu neologismojn, sed prudente kaj en etaj dozoj, kvankam ili neniam determinas, kiom la prudento permesas, kaj kiom devas esti la etaj dozoj.

Kiel responsaj esperantistoj kaj aŭtoroj, la Iltis-skolanoj, gvidataj ankaŭ de sia artisma sento, tre bone konscias, ke la lingvo, pro sia specifa naturo, ne toleras troan akcelon evoluon sen risko de skismiĝo.

La Iltisa Skolo turnas sin al esperantistoj, kiuj favoras ĝian pozicion, kaj invitas ilin subskribi ĉi Manifeston kaj kunaktivi kontraŭ la rutino, la inercio kaj la involuciaj tendencoj forte

manifestiĝantaj, ankoraŭ en la cent-jara dat-reveno de Esperanto, en multaj verkoj originalaj kaj tradukitaj kaj en la kritikaj taskoj de kelkaj recenzistoj.

### Analiza Skolo

*Laŭ L. Mimó, la limoj de la lingvo Esperanto estas "strikte determinitaj surbaze de la logiko".*

*La limoj devenas de:*

*-la gramatiko, "scienco kiu difinas la lingvajn elementojn ne arbitre, sed laŭ ilia funkcio";*

*-la lingvaj reguloj;*

*-la postuloj de la analogio. Ne estas aplikebla, kio ne estas ĝenerale aplikebla.*

*L. Mimó kompletigis, kaj nombre reduktis al 14, la Fundamentajn Regulojn de Esperanto estigitajn de Zamenhof, kaj aperigis ilin en sia verko Esperanto por la Jaroj Du Mil. Pro tio, ke la 14 mimooj reguloj ampleksas 4 dense tajpitaĵoj, kaj ni ne havas tiom da spaco por ĉi tiu temo, jen specimeno, por ke la leganto juĝu.*

*Utile estus kompari la regulojn eldonitajn en Fundamento de Esperanto, kun la ĉi-sekvaj:*

### 2a Regulo

La *substantivoj* havas la finaĵon -o. Por la formado de la multnombro (pluralo) oni aldonas la finaĵon -j. Kazoj ekzistas tri: nominativo, akuzativo kaj prepozitivo. La akuzativo estas ricevata el la nominativo per aldono de la finaĵo





-n, kaj la prepozitivo per helpo de prepozicioj, kaj ĝi per si mem postulas nominativon.

Oni povas distingi tri klasojn de prepozitivo, nome, adjektiva prepozitivo, kiun oni povas transformi en adjektivon; adverba prepozitivo, kiun oni povas transformi en adverbon; kaj neŭtra prepozitivo, kiu ne estas transformebla.

El la transformeblaj prepozitivoj oni povas fari (kun)derivitajn adjektivojn aŭ adverbojn forlasante la artikolojn kaj la pluralojn kaj ofte ankaŭ la prepoziciojn, sed konservante ĉiam la saman ordon.

### 3a regulo

La *adjektivo* finiĝas per -a. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe la substantivo. La supereca komparativo estas farata per la vorto *pli*, la superlativo per *plej*; ĉe la supereca komparativo oni uzas la konjunkcion *ol* kaj la adverbon *kiom*, kvankam plej ofte ĉi tiu estas subkomprenata. La egaleca kvalifika komparativo estas farata per la korelativaj adjektiv-pronomoj *tia, kia*; la egalecaj kvanta kaj grada komparativoj, per la korelativaj adverboj *tiom, kiom*; la egaleca maniera komparativo per la adverboj *tiel* aŭ *same, kiel*, kiuj nur povas rilati al verbo, ĉu aga, kiel *ĉasi, vidi, pensi*, komparante la ag-manieron, ĉu stata, kiel *esti, ŝajni, stati*, komparante la est-samecon aŭ la est-manieron de du substantivoj.

Ĝenerale, *tiel* aŭ *same* estas subkomprenataj kaj oni uzas *kiel* sola, kaj, ĉar la korelativaj vortoj devas esti uzataj ĉim korelative, post *tia* aŭ *tiom* oni ne povas kompari per *kiel*, sen intermeto aŭ subkompreno de *tiel* aŭ *same*. Antaŭ adjektivo aŭ adverbo, por esprimi la gradon, oni neniam povas uzi *tiel*; nur *tiom*.

*Niaopinie, ĉi tiu skolo zorgas pli pri la gramatikeco de la verkoj ol pri ties kvalito. Tial, multaj opinias, ke la Analiza Skolo ne vere liveris valorajn literaturaĵojn al la Esperanta kulturo, kvazaŭ erudiciuloj de la Luma Jarcento kiuj vere alportis multon al la eŭropa kulturo, sed ne al ĝia literaturo. Male, la lltisa Skolo precipe klopodis pri la verkado, tre ofte trairante (iuj dirus) tro eksperimentemajn vojojn.*

*Ni konsilas al ĉiuj legantoj: konu la verkojn de viaj aliuloj (ne kontraŭuloj!) antaŭ ol kritikil! Kaj memoru: en fremda okulo ne vidu ligneron, por poste ne vidi trabon en la vial*

☆



## 10 sciindaj aspektoj pri Esperanto...

### ...kaj Afriko

● La unuaj esperantistoj en la afrika kontinento estis eŭropaj militistoj, kutime francaj, destinitaj en la kolonioj. Tiel, la unuaj informoj pri esperantistoj en Afriko venas de Tunizio en la jaro 1893, nur 6 jaroj post la aperigo de Esperanto. Ankaŭ ekzistis esperantistoj en Sudano jam en la jaro 1897 kaj en Alĝerio en 1899. Sed verŝajne la unuaj esperantistoj origine afrikaj estis en Madagaskaro: jam en adresaroj de la jaro 1901 aperas afrikaj nomoj en tiu lando.

● Rilate la hispanan zonon en la norda parto de Maroko, la unuaj esperantistoj ankaŭ estis militistoj: la kapitano Fernando Redondo fondis en 1913 esperantista grupo en Melilo, kie oni regule instruis la internacian lingvon. Same la s-ano Rafael Fiol, hispana militisto en Maroko, reprezentis la esperantistojn de la hispana Maroko en la andaluziaj kongresoj de Esperanto okazintaj inter 1917 kaj 1921.

● Kaj rilate la gazetojn, jam en 1905 aperis la dumonata revuo *La Alĝeria Stelo*, poste en tiu sama lando aperis *Afrika Esperantisto*. En aliaj landoj, kelkaj jaroj poste, troveblis *Maroka Stelo*, *Tunizia Espero*, *Egipta Esperantisto* kaj *The South African Esperantist*. Sed, flanke la historion, hodiaŭ ankaŭ estas eble legi afrikajn esperanto-revuojn, kiel *Bona Espero* en Sudafriko, *Alvoko* en Togolando kaj *Ovo* en tiu sama lando.

● Malgraŭ la malfacilaj ekonomiaj kaj sociaj cirkonstancoj de Afriko, en multaj landoj troveblas UEA-delegitoj, kaj diversaj naciaj asocioj disvastigas la internacian lingvon; ekz. Benina Esperanto-Asocio, Kotdivoara Esperanto-Asocio, Ganaa Esperanto-Movado, Asocio pri Esperanto en Kamerunio, Tanzania Esperanto-Asocio, Unuiĝo Togolanda por Esperanto, Malagasa Esperanto-Asocio, Zairia Esperanto-Asocio, Zimbabva Esperanto-Instituto kaj la Niĝeria Esperanto-Federacio.

● Pri la Zimbabva Esperanto-Instituto, estas necese elstarigi la laborojn de Oliver Mazodze por disvastigi la internacian lingvon ne nur en sia propra lando, Zimbabvo, sed ankaŭ en tiuj najbaraj, kiel Zambio, Malavio kaj Mozambiko. Li planas novan instruvojaĝon ĉi foje al Bocvano kaj Namibio. Oliver Mazodze estas UEA-delegito, fondinto de sia nacia asocio kaj diplomita Cseh-instruisto.

● La afrikaj esperantistoj havas kiel ĉefan kunvenon la Afrikan Kongreson de Esperanto. Ĉi-jare, la 4a kongreso okazis ĉe Moshi (Tanzanio) apud la Kilimanĝaro, en la unuaj tagoj de 1996. 38 gepartoprenantoj de diversaj landoj pruvis ke Esperanto estas realaĵo en Afriko kaj ke la organizado de Universala Kongreso de Esperanto en Afriko estas jam ebla ideo.



● Se la eŭropanoj ne trovas multajn malfacilaĵojn por ĉeesti la afrikajn kongresojn, escepte pro la mono kaj la klimato, oni ne povas aserti tion pri la partopreno de afrikanoj ĉe la Universalaj Kongresoj. Dum la lastaj jaroj, kelkaj registaroj neis la vizon kaj la enirrajton, malgraŭ la peto de la Lokaj Kongresaj Komitatoj, al esperantistoj de kelkaj afrikaj landoj kiuj deziris ĉeesti la Kongreson, pro la fakto ke la registaroj konsideris ilin eblaj kontraŭleĝaj enmigrantoj. RASISTOJ!!!

● Esperanto ankaŭ povas esti viv-rimedo en Afriko. Ne mankas en la esperanto-revuoj anoncoj de afrikaj samideanoj kiuj deziras komerci kun Eŭropo aŭ Ameriko pere de Esperanto. Menciinda estas ankaŭ la laboroj de la Junulara Esperantista Organizaĵo de Madagaskaro, kiuj krom praktiki la lingvon kreis entreprenon kies celo estas vendi ĵuvel-ŝtonojn kaj kvarcojn al eksterlandaj klientoj kaj havigi iom da enspezoj al siaj membroj.

● La Universala Esperanto-Asocio kreis la Fondaĵon *Afriko* por financi multfacetajn laborojn por disvastigi Esperanton en Afriko kaj la *Triamondan Kongresan Fondaĵon* kies celo estas helpi partopreni en Universalaj Kongresoj al triamondanoj, ne nur afrikanoj, invitataj de UEA, kiuj mem ne povas pagi ĉiujn kostojn. Se vi deziras helpi al tiuj fondaĵoj, kontaktu rekte kun UEA.

● Bedaŭrinde la afrikaj lingvoj ne estas tre reprezentataj en la Esperanto-gramatiko. Oliver Mazodze de Zimbabvo parolis pri la afrikaj vortradikoj en Esperanto okaze de la ĉijara Afrika Kongreso de Esperanto, aŭ fakte pri ties manko. Li proponis enkondukon de tiuj vortradikoj almenaŭ por afrikaj realaĵoj. Tamen, Afriko estas kontinento kiu instruas gravan lecionon al la cetera mondo rilate la internaciajn lingvojn. En la centro de la kontinento, kie ekzistas centoj da tribaj lingvoj, oni sukcesis establi komunan lingvon, la svahilan. En 1983 estis eldonitaj *Vortaro de Esperanto kaj Svahila kaj Esperanto: jifunze lugha ya kiesperanto*, lernolibro por svahililingvanoj.

J.M.R.H.

ATENTU: ĉi deka artikolo estas la lasta de ĉi rubriko. Ni esperas, ke en tiuj 100 aspektoj Vi trovis interesan kialon por daŭrigi la lernadon de la internacia lingvo aŭ por kreskigi Vian intereson en la Esperanto-Movado. Multajn Dankojn al tiuj kiuj sendis leterojn al la revuo rilate ĉi rubrikon.

AEU disponas korespondajn kursojn: bazan, mezan kaj superan. Diversaj prezoj, diversaj opcioj. Kaj vi ĉiam havos la helpon de koresponda instruisto. Kontakti AEU, p.k. 864, 29080 Malago.



## Paĝoj de nia Historio

### Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

#### Esperanto en la Sevila Foiro

Estas kutimo en Sevilo, ke ĉiu asocio, politika partio, entrepreno kaj eĉ grupo da geamikoj starigas propran budon en la mondkonata foiro de Aprilo. La celoj povas esti malsimilaj sed ĉefe ĉiuj pretendas plenjoĝi feliĉe kaj senamase dum tiu speciala semajno. Ekde la unuaj jaroj de nia jarcento, la Foiro de Sevilo meritis la atenton de la esperantistaj ĵurnaloj: ĉi tiel, en 1910 oni povis legi en *Gazeto Andaluza* ke "... Sevilo, je la enirado de la Printempo, solenigas, sur sia famkonata Herbejo nomita Sankta Sebastiano, la feston plej animan, plej karakterizan, plej gajan, belegan kaj luksan el tiuj, kiujn povas rigardadi homaj okuloj."

Sed la esperantistaro ankaŭ ĝuis dum la foiro kaj se estis normale starigi budon, ankaŭ la Sevila Esperanto-Grupo havis sian propran ĝojejon ene de la Foiro. La redaktoro de la revuo *Andalucia Ilustrada* subskribis raporton (en la jaro 1918), akompanitan de foto, kaj rakontis kiamaniere li estis regalita en tiu budo, kie akompanis lin afabla kapitano (sendube temas pri la s-ro Rafael Fiol Paredes), kiu invitis lin, laŭ la ĵurnalisto, glason post glaso da vino en budo kie la dancado estis senĉesa.




Ĉi konitaĵojn ni povas oferi al Vi dank' al la ekzisto de la Arĥivo de AEU, kie ni pretendas gardi ĉion rilatan al la Esperanto-Movado en Andaluzio. Verŝajne ni tro pretende nomas tiun sekcion Arĥivo, malgraŭ la fakto, ke ĝi estas nur kolekto de antikvaj ĵurnaloj kaj esperantaĵoj. Tamen, ni volas krei veran arĥivon, la arĥivon de Via memoro. Do, se Vi ne scias kion fari kun Viaj E-revuoj aŭ esperantaĵoj kaj Vi estas preta doni ilin al ni, bv. kontakti kun ni. Ni pagus ĉiajn sendokostojn.

HISTORIA ARĤIVO DE AEU  
POŝTKESTO 611 — E-14080 KORDOVO.



## Krucvortenigmo



## Horizontale

- 1 Lingvo eŭropa  
6 Rilata al karnovora besto afrika  
8 Malmultekosta  
10 Inverse, morale malbona  
12 Internacia Lingvo  
13 Inverse, rilata al iu insekto  
flugokapabla  
15 Konsonnomo  
16 Inverse, mineral' entenanta  
utilajn ekstrakteblajn metalojn  
17 Denova, ripetita  
18 Demanda frazero  
19 ... sur seĝo  
21 Inverse, fama institucio lingva  
de Hispanio

## Vertikale

- 1 Teori' de Mussolini k.a.  
2 Ero el fama eŭropa montaro  
3 Maljesa  
4 Konsonnomo  
5 Metrika unu', devenanta de la  
latingreka metriko  
7 Internacia institucio uzanta  
Esperanton.  
9 Instrumento  
11 Etendiĝas de unu flanko de la  
ŝipo al la alia (sen finaĵo)  
13 Sufikso  
14 Eligi plendan ĝemon  
16 Inverse, romia torturil'  
18 Persekut' kaj mortig' bestojn



- 22 Adverbo  
23 Vaska  
24 Komenc'!

20 Marŝe

21 Pseŭdoprefiksoido helendevena

Jen la solvo al la krucvortenigmo  
de *Gazeto Andaluzia* 46:

Vi scias, pri la eraro en la  
enigmo de la 45a numero.  
Komence, ĉinummere ni lotumis  
du premiojn, kiujn ricevas niaj  
fidelaj legantoj Alfonso  
Escamilla (el Linares) kaj A.  
Junusov (kiu legis nin en  
Hungario sed ricevos la  
premion en Dagestan', Rusio).

Ĉifoje sendu vian solvon al la  
redaktoro (p.k. 5184, 29080 Malago) antaŭ la 15a de novembro, 1996.



## Profiti la flugilojn de la favora vento

Ekzistas diversaj liter-fonto-programoj por skribi Esperante. En Internet oni povas legi jam *Eventoj*-n. E-programoj kaj kursoj ekzistas en la germana, angla kaj franca [kaj hispana] *Aldono de la redakcio* Hungario havas daŭrigan kurson. Estas diskut-forumoj kaj semajnaj renkontiĝoj en Internet. En kelkaj BBS-oj Esperanto estas elektelebla lingvo. Pasintjare, VIP-Infomadiko en Belo Horizonte lanĉis en la portugala programon Info-Esp (informoj pri Esperanto, lingvo, movado, servoj, kun aŭtomata serĉ-vortaro, perkomputila baza kurso ktp). En la 32a Brazila Esperanto Kongreso (julio) la Stomatologia Sekcio de UMEA lanĉis disketon kun Dentista Fakvortaro (Esperanto-Esperanto) kaj oni lanĉos la version 2.1 kun mil vortoj en la aŭtomata vortaro. Nun oni serĉas tradukantojn por aliaj lingvoj. Por la UK de Aŭstralio oni planas prezenti la version 4.0.

UEA, kiu jam havas paĝon en Internet, devas profiti la flugilojn de la favora vento, aktivigi sian gazetarajn servojn kaj pere de e-poŝto, ĉiumonate, provizi la TV- kaj gazet-redakciojn per taŭga inform-materialo.

ROBERTO RESENDE

HERALDO DE ESPERANTO, N-RO 10/1996.



## Alvoko

## (Ĝenerala Asambleo de AEU 1996)

Mi alvokas ĉiujn membrojn de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo por ĉeesti kaj partopreni Ĝeneralan Asembleon de ĉi tiu asocio kiu okazos la 12an de oktobro, 1996 je la 16 horo en la *Centro de Comunicación Humanista*, Pasaje Mármoles, Local 7, Malago, por pritrakti la jenon:

- Legado de la protokolo de la antaŭa kunveno
- Bilanco de la Asocio
- Modifo de membrotitoloj
- Perkorespondaj kursoj
- Aliaj kursoj
- Kristnaska Loterio
- Esperanto en Bibliotekoj
- Esperanto ĉe Eŭropa Parlamento
- Beletra Konkurso
- *Gazeto Andaluzia* kaj *Monate ĉe Vi*
- Konkurso okaze de la 50a numero de *Gazeto Andaluzia*
- Turismo
- U.R.E. / Esperanto kaj Radio
- Informoj de grupoj kaj izolitaj membroj
- Renovigo de la Estraro
- Propagando
- Petoj kaj Demandoj

Malago la 1an de septembro, 1996

ANDRÉS MARTÍN

PREZIDANTO DE A.E.U.



Se vi ne povas ĉeesti persone la kunvenon, bonvolu rajtigi alian anon de la asocio por ke li reprezentu vin kaj voĉdonu je via nomo.

Mi rajtigas .....,  
anon de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, por ke, je mia nomo, li voĉdonu la proponojn prezentotajn en la Ĝenerala Asembleo de ĉi tiu Asocio, kiu okazos en Malago la 12an de oktobro, 1996. Tiucele mi aldonas fotokopion de mia identiga karto (D.N.I.) aŭ pasporto.

Dato:.....

Subskribis:.....



Se vi ne trovas en *Gazeto Andaluzia* kion vi ŝatus legi bonvolu mem verki artikoleon. Ni volonte aperigos ĝin kondiĉe ke ĝi rilatu Esperanton aŭ Andaluzion. Se eble, sendu ĝin al la redaktoro (Poŝtkesto 5184, 29080 Malago) sur komputila disketo (PC aŭ Macintosh, kompreneble resendota), klare tajpita aŭ per e-poŝto (joser@lander.es).

## Esperanto Aplikata

Ĉi tie oni povus legi VIAN anoncon. SENPAGE. Aŭ tiun de viaj amikoj, najbaroj... Simple skribu leteron al ni, kaj via anonceto aperos en nia venonta *Gazeto Andaluzia*.

● Tranoktado, seminariado en Elzacol Jam kelkcento da homoj (esperanto-parolantoj aŭ ne) seminariis en Elzaco pro TAKE - LA DOMO. Ili restadis en la seminariejo *Centre de Mittelwihr*; 16, rue du Bouxhof, FR 68630 Mittelwihr (Francio). Tel. (+33) 89 47 93 09; fakso (+33) 89 49 02 25. Nepre kontaktu TAKE - LA DOMO!

● Aliaj centoj jam gustumis la Esperanto-vinojn SYLVANER - RIESLING - GEWURZTRAMINER - CREMANT. Philippe Gocker: 24,

rue de Riquewihr, FR - 68630 Mittelwihr (Francio). Fakso: (+33) 89 49 04 72. Por ĉiaj ajn informoj turnu vin ĉe TAKE - LA DOMO.

● La 103paĝa kajero de la *Nederlandaj (aŭ Germanaj, Anglaj, Francaj) plant-nomoj kun ties Esperantaj kaj Scienc-Latinaj ekvivalentoj kaj REF-regularo* estas haveblaj ĉe Bernhard eichkorn, Romaeusing 20, D-78050 Villingen (Germanio) kontraŭ po 10 GEM + sendkostoj. La ĉeflisto haveblas ĉe la sama adreso sur disketoj (*Word Perfect*) por 10GEM + sendokostoj kaj elprintite (ĉ. 750 p.) kun ĉiuj listoj por 50 GEM + sendokostoj.

● Tradukistoj serĉataj. Internacia organizo de sendependaj sindikatoj de fervojaj lokomotivistoj (ALE) havas membro-organizon en 10 eŭropaj





Informoj pri la E-movado tra la mondo. Raportoj kaj artikoloj pri Ĉinio. Peranto en Hispanio: Félix Gómez Martín, Corbeta 8-5ª, 28042 Madrid.

10 Heroldo de Esperanto. La plej populara gazeto en la internacia lingvo. Peranto en Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, 08202 Sabadell (Barcelona).

10 En januaro estis lanĉita nova Esperanto-vino en Kroatio. Frambovin estas likvora vino el framboj konvena por servi kun kukoj; en specialaj boteloj de duonlitro. Familio Štefančič, Gornja Vrba; Vrpskih zrtava 83; HR-35000 Slavonski Brod, Kroatio.

10 Informe sobre el Esperanto 2. Hispanlingva programo pri Esperanto. Haveblas en 2 versioj: provversio (1 disko), kontraŭ 300 ptoj (poŝtstampoj) aŭ sendante diskon kaj ŝtampitan koverton; versio kompleta (5 diskoj) kontraŭ 2000 ptoj (per antaŭpago) aŭ 2000 ptoj + sendokostoj. Ambaŭ versioj ebligas aŭskulti esperantajn vortojn kaj muzikaĵojn (kompreneble pli da ili en la versio kompleta). Perfekta por viaj neesperantistaj geamikoj. J. F. Martín del Pozo, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago, Hispanio.

10 Alzacaj esperanto-vinoj: Philippe Gocker, 24 rue de Riquewihr, FR-68630 Mittelwihr. Fakso: [+33]89.49.04.72.

10 Ni akceptas ĉiuspecajn laborojn. Senpagan kaj sendevigan informadon. Lundojn, merkredojn kaj vendredojn je la 7a vespere. Adreso: Bossa de Treball, Doctor Zamenhof 29, Barcelona. Tel: (93)3075570, matene.

10 Librería Álvarez, Luis Braille 8, Local B (apud la preĝejo *Ntra Señora de la Amargura*), Malago, Hispanio. Ankaŭ libroj en/pri esperanto.

10 Ĉiumonate la Komerco-kaj Industrioĉambro de Colmar kaj Centra Alzaco (Francio) eldonas liston de ne-okupitaj ejoj, kiun ĝi disponigas senpage al informpetintoj serĉantaj ejojn profesiajn, komercajn, oficeajn, laborajn kaj ankaŭ terenojn. Ekde la fino de januaro 1996, tiu listo kun pli ol 200 adresoj estas konsultebla pere de Internet en la lingvoj franca, germana, angla kaj en Esperanto. Baldaŭ la bildoj de la proponataj objektoj estos montrebblaj. Konsultu <http://www.rmnet.fr/cci>; e-poŝto: [cci-colmar@rmnet.fr](mailto:cci-colmar@rmnet.fr).



## KVARA INTERNACIA KULTURA KAJ TURISMA ESPERANTO-SEMAJNO (I.K.T.E.S.)

Adreso: Fervoĵista Esperantista Asocio. Apartat 15027. ES-08080  
Barcelono, (Katalunio) Hispanio  
(SUB LA AŬSPICIOJ DE HISPANA ESPERANTO-MUZEJO)  
De la kvina ĝis la dekdua de oktobro 1996

C A L E L L A

\*\*\*\*\*

"COSTA DEL MARESME"

PETICIO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ FAVORE AL ESPERANTO

Universala Esperanto-Asocio, post la Dua Mondmilito, organizis tutmondan kampanjon favore al Esperanto. Por tio estis presita la jena mallonga deklaro en 25 lingvoj:

DEKLARACIO:

"Mi opinias, ke la solvo de la problemo de internacia lingvo havas grandan praktikan gravecon kaj Unuiĝintaj Nacioj devus preni ĝin en seriozan konsideron.

Mi opinias, ke monda helpa lingvo, kiu ne forigos la lingvojn naciajn, sed servos al ili kiel helpa lingvo, estas necesa por faciligi la rilatojn inter la popoloj de la tuta mondo kaj por rapidigi la socian progreson. Pro la bona akcepto de Esperanto en ĉiuj partoj de la mondo - la sola helpa lingvo, kiu havis rimarkindan sukceson - mi esperas, ke Unuiĝintaj Nacioj helpos, per ĉiuj rimedoj disponeblaj, la vastigon de la uzo de tiu ĉi lingvo, ekzemple kuraĝigante ĝian instruadon en la lernejoj, kiuj disponas pri kompetentaj instruistoj, kaj evoluigante ĝian uzon en la turismo, internacia komerco kaj korespondado."

Ĝis la fino de 1949 subskribis la Petskribon 492 internaciaj kaj naciaj organizoj (entute, 15.454.780 membroj) kaj, krome, 895.432 individuaj personoj. 76 landoj partoprenis per subskriboj.

Inter la gravuloj kiuj subtenis kaj subskribis la Petskribon estis:

Vincent Auriol, Prezidento de Francio;

La ĉefministroj de Nederlando, Aŭstrio, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio;  
495 membroj de parlamentoj;

Sindikata Asocio de Okcidenta Germanio, Aŭstria Popola Partio, Federacio de Fervojaj Laboristoj de Japanio, Norvega Federacio de Laboro, Japana Unio de PTT-Laboristoj, Japana Unio de Ministroj; 1.607 lingvistoj, 5,262 universitataj profesoroj, 40.000 ĝeinstruistoj de mezgradaj kaj elementaj lernejoj, 1.228 edukaj fakuloj, 1.519 ĵurnalistoj, 5.113 kuracistoj, 211.734 juristoj, inĝenieroj, farmaciistoj kaj konstruistoj, 284.512 komercistoj, pli ol 200.000 diversaj metiistoj kaj pluraj dekmiloj de diversfakaj laboristoj.

\*\*\*\*\*  
\*\*\*\*\*  
\*\*\*\*\*